News items under this heading should be sent to your local newspapers. Always mention the source: "Esperanto" or "Amerika Esperantisto." Please send copies or clippings of reprints to the Central Office

After many years of painstaking preparation, Italian Esperantists have finally obtained the consent of the important "Touring Club Italiano" to issue, experimentally, the first volume of a series of Esperanto guide books, to be known as "La Verdaj Gvidlibroj." These volumes will be exact duplicates, in size, arrangement and typography of the well-known "Baedekers" and "Guides Bleus."

"Milano kaj Lagoj de Lombardio" is the title of the first volume. Its 144 finely-printed pages, nine folding maps and six plans, deal with the most picturesque part of all Italy. The book is pocket-size, like its English, French, German and Italian predecessors and is attractively and durably bound in strong, flexible green cloth, with gold lettering. Every Esperantist will be proud to own
(Continued on Page 115)

A Short Course in Esperanto

LESSON VI

Esperanto has three active participles:

-ant-	present:	
-int-	past:	
-ont-	future:	

parolanta, speaking
parolinta, having spoken
parolonta, about to speak
kuranta, running
kurinta, having run
kuronta, about to run

la sinjorino parolanta al vi estas mia fratino,
 the lady speaking to you is my sister

la viro parolinta al ili estas juna,
 the man who spoke to them is young

la letero venonta de mia frato estos longa,
 the letter which is to come from my
 brother will be long

The active participles can also take the noun ending *o* and signify a person doing what the verb expresses.

parolanto, a speaker
parolinto, one who has spoken
parolonto, one who is about to speak

An adverb may be formed from the participle by adding the ending *e*.

kurante el la ĝardeno mi vidis grandan arbon,
 running out of the garden I saw a big tree

vidinte kiu vi estas mi rifuzas veni kun vi,
 having seen who you are I refuse to come
 with you

estonte ne voku min,
 do not call me in the future

<i>avo</i> , grandfather	<i>najbaro</i> , neighbor
<i>nepo</i> , grandson	<i>agrabla</i> , pleasant
<i>kuzo</i> , cousin	<i>voki</i> , to call
<i>nevo</i> , nephew	<i>rifuzi</i> , to refuse
<i>vidvo</i> , widower	<i>preskaŭ</i> , almost
<i>fraŭlo</i> , bachelor	<i>almenaŭ</i> , at least

Ordinal numbers have the adjective ending *a*.

unua, first *deka*, tenth

dimanĉo estas la unua tago de la semajno
kaj sabato estas la sepa,

Sunday is the first day of the week and
 Saturday is the seventh.

The prefix *ge-* denotes persons of both sexes taken together and, when a noun, is always in the plural.

<i>gepatroj</i> ,	father and mother, parents
<i>gefratoj</i>	brother and sister
<i>geamikoj</i> ,	friends (male and female)
<i>gepatra</i> ,	parental

The prefix *bo-* denotes relationship by marriage, -in-law.

<i>bopatro</i> ,	father-in-law
<i>bofratino</i> ,	sister-in-law
<i>bogepatroj</i> ,	father and mother-in-law

mi skribis al mia bofrato longan leteron,
 I wrote a long letter to my brother-in-law

<i>parenco</i> , relation	<i>renkonti</i> , to meet
(ship)	<i>viziti</i> , to visit
<i>arto</i> , art	<i>stari</i> , to stand
<i>publika</i> , public	

The suffix *ad* denotes duration and continuation of action.

paroladi, to have a speech
parolado, a speech

lia parolado estis tre agrabla,
 his speech was very pleasant

<i>ĉiu</i> , every (body)	<i>ĉiuj</i> , all
<i>iu</i> , somebody	<i>neniu</i> , nobody, none

EXERCISE

En la ĉambro estas tri sinjoroj; ili ĉiuj havas paroladon. La unua jam parolis; li estas la parolinto. La dua nun parolas; li estas la parolanto. La tria baldaŭ parolos; li estas la parolonto. Mia bofratino vizitis min hieraŭ kun la gepatroj de mia kuzino. Vizitante mian onklon mi ankaŭ vidis la najbarinon. La virino staranta apud la dua domo estas mia bopatrino.

Did you meet the widow of my friend? Yes, she visited me yesterday. Speaking about languages, Esperanto is the second language for all. Having read his new book I shall send it to you. My father and mother-in-law will eat with us tomorrow. Public speaking is an art.

LESSON VII

Esperanto has three passive participles:

present:	-at-
past:	-it-
future:	-ot-

amata, loved
amita, having been loved
amota, about to be loved
vidata, seen
vidita, having been seen
vidota, about to be seen

li estas amata de ĉiu,
 he is loved by everybody

letero skribita de mi,
 a letter written by me

la ĵurnalo ne estis ricevita de li,
 the journal had not been received by him

la libro estas ankoraŭ sendota,
the book is still to be sent

Nouns and adverbs are formed from passive participles with the endings *o* and *e*.

amatino, sweetheart
sendito, one who has been sent, messenger,
delegate

The conditional mood of the verb has the ending *us*.

mi parolus, I should speak
li estus, he would be
ili irus, they would go

mi helpus al vi se mi havus tempon,
I should help you if I had time

pensi, to think *fari*, to do, make
malhelpi, to hinder *danki*, to thank
diri, to say *deziri*, to wish, desire
estimi, to esteem *kredi*, to believe

The suffix *an* denotes an inhabitant, member or partisan.

Kristo, Christ *kristano*, christian
Usono, U. S. A. *amerikano*, american
Bostono, Boston *bostonano*, bostonian
Ameriko, America *usonano*, U. S. citizen, american

mi vizitis miajn gekuzojn; ili estas filadelfianoj,

I visited my cousins; they are philadelphians
se vi loĝas en Nov-Jorko, vi estas novjorkano,

If you live in New York, you are a new-yorker

loĝi, to live, dwell *kiel*, how
vojaĝi, to travel *tiel*, so
urbo, town, city *se*, if
veturi, to go (by vehicle)
tuj, at once, immediately

The suffix *ist* denotes trade, profession or occupation.

ŝuo, shoe *ŝuisto*, shoemaker
dento, tooth *dentisto*, dentist

mateno, morning *ĝoji*, to be glad
vespero, evening *forgesi*, to forget
nokto, night *promesi*, to promise
rakonti, to tell, relate *afabla*, affable, kind
ridi, to laugh *adiaŭ*, goodbye

mi deziras al vi bonan matenon,

I wish you a good morning
bonan vesperon, gesinjoroj,

good evening, ladies and gentlemen
bonan nokton, kara patrino,

good night, dear mother

The suffix *eble* denotes possibility (as in english -ble, -ible).

videbla, visible *eble*, possibly, perhaps
kredebla, credible
aŭdeble, audibly

via rakonto estas tre kredebla,
your story (tale) is very credible

lia skribo ne estas legebla,
his writing is not legible

minuto, minute *monato*, month
sekundo, second *eterna*, everlasting, eternal
boro, hour
jaro, year *sincera*, sincere
plezuro, pleasure *esperi*, to hope
lando, country, land *saluti*, to greet, salute
edzo, husband *lerni*, to learn
fremda, foreign *dum*, during
tuta, whole *ke*, that (conj.)
facila, easy

EXERCISE

Estimata Sinjoro:

Mi ricevis vian afablan leteron skribita en nia lingvo Esperanto. Mi tre ĝojas ke mi scias ĝin legi. Mi dankas al vi por via promeso sendi al mi la novan libron "Sep Ridoj" kaj mi legos ĝin kun vera plezuro. Mia edzino nun ankaŭ lernas Esperanton kaj mi esperas ke ni baldaŭ estos bonaj geesperantistoj. Vere, Esperanto estas la dua lingvo por ĉiu, kaj se la tuta mondo ĝin lernus, la vojaĝado en fremdaj landoj estus facila. Mi esperas viziti Eŭropon dum la venonta jaro kaj mi faros bonan uzon de mia scio de Esperanto.

Esperante (esper'ant'e) ke ni baldaŭ havos la plezuron de via promesita vizito, mi vin salutas tre sincere via

TEODORO JONES.

Good morning, grandmother. Good morning, children. Did you sleep well? These flowers have been sent by the new florist. His story is very short. I forgot that you did not learn our language. How do you say in Esperanto "thanks?" You say "dankon." And how do you say "how do you feel?" You may (povas) say "kiel vi sanas." Promise me that you will do it. The gardener lives now in the city. Good-bye and much pleasure during your trip (vojaĝo).

FOREIGN ESPERANTO NEWS

(Continued from Page 113)

a copy and to exhibit it as a most convincing proof of the growing utility of the international language.

Order at least one copy today—order several if you can! The early sale of this experimental edition will result in the preparation of a similar guide-book covering another part of Italy. Eventually all of Italy and other parts of Europe may be thus covered by Esperanto guide-books. On the other hand, a scant demand for this first volume will delay, perhaps for years, any further progress in this direction. It's up to US—please do your part. Order from Esperanto Association of North America, Fort Lee, N. J. The price is \$1.00 each, post-paid.

Novaj Libroj : New Books

Du Majstro Noveloj de Theodor Storm. Tradukitaj el la germana lingvo de Heino Heitmüller. Heroldo de Esperanto, Koln, Germanujo. 158 paĝoj, Broŝurita R. M. 2.40, Bindita R. M. 4.

Storm estas populara novelisto. Tiuj-ĉi du noveloj kaj lia Imenlago antaŭe tradukita, estas veraj literaturaj gemoj.

La Blankĉevala Rajdanto estas legendo de Frislando pri iu digografo (digomajstro) dum la mezo de la dekoka jarcento. Ĝi estas interesa rakonto pri la konstanta batalo kontraŭ la Norda Maro. La traduko estas tre bona kaj la tradukinto klarigis la maloftajn teknikajn vortojn kiujn li devis uzi.

Violo Trikolora estas mallonga rakonto pri knabineto kiu unue ne deziris akcepti sian novan duon-patrinon sed poste amo venkis. La libro tre plaĉas.

CHARLES H. BRIGGS.

Malriĉa Knabo Kiu Gloriĝis, de Dro. Jan Herben. Tradukis T. Mroskova kaj eldonis la Moraviaj Esperanto Pioniroj, Esperantista Klubo en Praha, Ĉeĥoslovakio. 136 paĝoj, Prezo 2.50 Fr. Sv.

Tre alloga libro pri la vivo de Dro. T. G. Masaryk, prezidanto de la Ĉeĥoslovaka respubliko. Vere travibriga kaj entuziasmiga historieto de tiu ĉi homamanta eminentulo kiu estas dediĉinta sian longan vivon por inspiri nacian sentadon en la Ĉeĥoj kaj Slovakoj. Frue kaj longe per popularaj paroladoj li instruis sian novan filozofion pri la homa vivo kaj la neceso de moralo kaj religio en la konduto de homoj kaj nacioj. Poste dum la milito li gvidis la novan nacion tra multaj malfacilaĵoj. Per siaj laboregoj li iĝis vere la patro de sia lando, tre amata kaj estimata de ĉiuj. Ĉiu interesata pri la historio de Eŭropo devus legi la libron. Unu frazo (p. 110) ne estas klara sed plejparte la stilo estas bona kaj senerara.

CHARLES H. BRIGGS.

Pinokjo (Pinocchio) de C. Collodi. Tradukis Mirza Marchesi, ilustris W. H. Matthews kaj redaktis L. N. Newall. 150 p. 1930. The Esperanto Publishing Co., Ltd., 142 High Holborn, London, W. C. 1 Broŝ. 3 ŝilingoj 6 p., bindita 5 ŝ., afranko 4 p.

Mi supozas ke tiu ĉi feina rakonto pri la aventuroj de marioneto estas la ĉefa porinfana klasiko — la "Alicio en Mirlando" de Italujo. Legante ĝin, ĉiu infano kaj plenaĝulo havas vivecan plezuron. La aventuroj de la naiva heroo kaj liaj renkontatoj — Ĝepeto, Grilo-Parolanta, Manĝas-fajron, la Vulpo, la Kato, la bluhara Knabineto-kaprineto-feino la Papago, la Serpento, la terura astma Ŝarko, la Fiŝkaptisto, Maĉo kaj liaj kunzenetoj donas intereson ĝis la lasta paĝo. La stilo estas klara kaj simpla; foje oni rimarkas frapantajn vortojn kaj ideojn (ekz. "koketo je la unua

kanto," "farunumi," "tineumita," "fritzumi," "ĉe la duontempo de la granda festo," "kremo ŝaumekirlita" "akvo falis mulsupren po pelvoj," "dentegoj kiuj estus timigintaj nur viditaj sur pentraĵo.") Malgraŭ kelkaj tre malmultaj ne ĉiam tuj kompreneblaj vortoj kaj idiotismoj ("beki belan gajnon," "mi por via regulo estas marioneto," glio, tuno) oni povas senti kiom bone la traduko konservas la kuriozan guston de la originalo.

CHARLES H. BRIGGS.

Viktimoj de Julio Baghy. Originala romano, dua eldono. Ĉefkomisio de librovendejo de Hungaria Esperantista Societo Laborista, Budapest. 237 paĝoj. Broŝ 5.50 P. Tole bind. 8.20 P.

La dua eldono de tiu ĉi tre ŝatata libro. Ĝi rakontas la vivojn de Hungaraj militkaptitoj en Siberio per fluantaj, facile kompreneblaj frazoj. La verkisto mem estis militkaptito kaj pentras frapantajn bildojn de mizero, milito, malamikeco, kaj emociiga amo. Li vivigas la rolulojn kaj okaze miksas humoron kun la tragedio. Li uzas vortojn artiste (ekz. frazĉifonoj, surplanden! plumbfermita). Preskaŭ ĉiu ĝuus tiun ĉi libron spite de tro multe da preseraroj. La verkisto preparas daŭrigon nomotan "Infero."

CHARLES H. BRIGGS.

La Mortado; publika parolado (1900) de Prof. Dro. Herman Nothnagel. Tradukis Bernard Selzer. Esperanto Societo, Progreso, Vieno. Prezo 1 germ. marko.

Traduko el la germana lingvo pri la mortado kiel objektiva, fizika fenomeno. La paroladinto kiu mem mortis en 1905 ne rediris la fakton ke preskaŭ ĉiu nun estas mortinta. "Iu statistikisto laŭdire elkalkulis ke de post la historiaj tempoj ĉirkaŭ sep miliardoj pereis ĝuste sur la batal-kampo." "Tuberkulozo" "forrabas proksimume la sepan parton de la homaro." Preskaŭ ĉiuj mortas pro ekstera fortego aŭ malsano, pro nematura finiĝo de la vivo. Treege malmultaj mortas pro maljuneco "kiel lampo, kies oleo estas konsumita." La biologia procedo de mortado estas la morto de ĉelaj grupoj. "La ĉeso de la specifaj cerbo-funkcioj, nome la procedoj de la konscio, per si mem ne estas la kaŭzo de la morto, sed la homo mortas preskaŭ ĉiam de la koro aŭ pli ĝuste pro la manko de oksigeno en la sango per sufokiĝo de la ĉeloj kaj histoj. Ne mortado sed malsano estas turmentoplena. La mortado mem estas preskaŭ ĉiam sen doloro, sen sufero. Eĉ ĉe klara intelekto, la malsanulo ĉe akute febraj malsanoj havas tiel altgradan apation, ke ne faras impreson, ĉu li davas morti aŭ ne. Fine "la teruroplenaj opinioj pri la fizika mortado plej multe ekzistas nur en la imago." Iu kiu iam vidis "Internacia Medicina Revuo" scias ke Esperanto estas speciale utila por sciencaj verkoj. CHARLES H. BRIGGS.

La Deveno de Esperanto

(Daŭrigo)

paroloj inklindos la homojn revivigi unu el tiuj ĉi lingvoj por komuna uzado. Poste, mi ne memoras jam kiamaniere, mi venis al firma konvinko, ke tio ĉi estas neebla, kaj mi komencis malklare revii pri *nova*, arta lingvo.

Mi ofte tiam komencadis iajn provojn, elpensadis artifikajn riĉegajn deklinaciojn kaj konjugaciojn, k. t. p. Sed homa lingvo kun ĝia, kiel ŝajnis al mi, senfina amaso da gramatikaj formoj, kun ĝiaj centoj da miloj de vortoj, per kiuj min timigis la dikaj vortaroj, ŝajnis al mi tia artifa kaj kolosa maŝino, ke mi ne unufoje diradis al mi: for la revojn! tiu ĉi laboro ne estas laŭ homaj fortoj, — kaj tamen mi ĉiam revenadis al mia revo.

Germanan kaj francan lingvojn mi ellernadis en infaneco, kiam oni ne povas ankoraŭ kompari kaj fari konkludojn; sed kiam, estante en la 5-a klaso de gimnazio, mi komencis ellernadi lingvon anglan, la simpleco de la angla gramatiko jetiĝis en miajn okulojn, precipe dank' al la kruta transiro al ĝi de la gramatikoj latina kaj greka. Mi rimarkis tiam, ke la riĉeco de gramatikaj formoj estas nur blinda historia okazo, sed ne estas necesa por la lingvo. Sub tia influo mi komencis serĉi en la lingvo kaj forjetadi la senbezonaĵajn formojn kaj mi rimarkis, ke la gramatiko ĉiam pli kaj pli degelas en miaj manoj, kaj baldaŭ mi venis al la gramatiko plej malgranda, kiu okupis sen malutilo por la lingvo ne pli ol kelkajn paĝojn. Tiam mi komencis pli serioze fordoniĝi al mia revo. Sed la grandegulaj vortaroj ĉiam ankoraŭ ne lasadis min trankvila.

Unu fojon, kiam mi estis en la 6-a aŭ 7-a klaso de a gimnazio, mi okaze turnis la atenton al la surskribo *Švejcarskaja*, kiun mi jam multajn fojojn vidis, kaj poste al la elpendaĵo *Konditorskaja*. Tiu ĉi *skaja* ekinteresis min kaj montris al mi, ke la sufiksoj donas la eblon el unu vorto fari aliajn vortojn, kiujn oni ne devas aparte ellernadi. Tiu ĉi penso ekposedis min tute, kaj mi subite eksentis la teron sub la piedoj. Sur la terurajn grandegulajn vortarojn falis radio de lumo, kaj ili komencis rapide malgrandiĝi antaŭ miaj okuloj.

La problemo estas solvita! — diris mi tiam. Mi kaptis la ideon pri sufiksoj kaj komencis multe labori en tiu ĉi direkto. Mi komprenis, kian grandan signifon povas havi por la lingvo konscie kreata la plena uzado de tiu forto, kiu en lingvoj naturaj efikas nur parte, blinde, neregule kaj neplene. Mi komencis kompari vortojn, serĉi inter ili konstantajn, difinitajn rilatojn kaj ĉiutage mi forjetadis el la vortaro novan grandegan serion da vortoj, anstataŭigante tiun ĉi grandegan per unu sufikso, kiu signifis certan rilaton. Mi rimarkis

tiam, ke tre granda amaso da vortoj pure *radikaj* (ekz. patrino, mallarĝa, tranĉilo, k. t. p.) povas esti facile transformitaj en vortojn *formitajn* kaj malaperi el a vortaro. La meĥaniko de la lingvo estis antaŭ mi kvazaŭ sur la manplato, kaj mi nun komencis jam labori regule, kun amo kaj espero. Baldaŭ post tio mi jam havis skribitan la tutan gramatikon kaj malgrandan vortaron.

Tie ĉi mi diros ĝustatampe kelkajn vortojn pri la materialo por la vortaro. Multe pli frue, kiam mi serĉis kaj eljetadis ĉion senbezonaĵan el la gramatiko, mi deziris uzi la principojn de la ekonomio ankaŭ por la vortoj kaj, konvinkita, ke estas tute egale, kian formon havos tiu aŭ alia vorto, se ni nur *konsentos* ke ĝi esprimas la donitan, ideon, mi simple *elpensadis* vortojn, penante, ke ili estu kiel eble plej mallongaj kaj ne havu senbezonaĵan nombron da literoj. Mi diris al mi, ke anstataŭ ia 11-litera interparoli ni tute bone povas esprimi la saman ideon per ia ekz. 2-litera *pa*. Tial mi simple skribis la matematikan serion da plej mallongaj, sed facile elparoleblaj kunigoj de literoj kaj al ĉiu el ili mi donis la signifon de definitiva vorto (ekz. *a, ab, ac, ad, . . . ba, ca, da, . . . e, eb, ec, . . . be, ce, . . . aba, aca, . . . k. t. p.*). Sed tiun ĉi penson mi tuj forjetis, ĉar la provoj kun mi mem montris al mi, ke tiaj elpensitaj vortoj estas tre malfacile ellerneblaj kaj ankoraŭ pli malfacile memoreblaj. Jam tiam mi konvinkiĝis, ke la materialo por la vortaro devas esti romana — germana, ŝanĝita nur tiom, kiom ĝin postulas la reguleco kaj aliaj gravaj kondiĉoj de la lingvo. Estante jam sur tiu ĉi tero, mi baldaŭ rimarkis, ke la nunaj lingvoj posedas grandegan provizon da pretaj jam vortoj internaciaj, kiuj estas konataj al ĉiuj popoloj kaj faras trezoron por estonta lingvo internacia, — kaj mi kompreneble utiligis tiun ĉi trezoron.

En la jaro 1878 la lingvo estis jam pli — malpli preta, kvankam inter la tiama lingve uniwersala kaj la nuna Esperanto estis ankoraŭ granda diferenco. Mi komunikis pri ĝi al miaj kolegoj (mi estis tiam en 8-a klaso de la gimnazio). La plimulto do ili estis forlogitaj de la ideo kaj de la frapinta ilin neordinara facileco de la lingvo, kaj komencis ĝin ellernadi. La 5-an de decembro 1878 ni ĉiuj kune solene festis la sanktigon de la lingvo. Dum tiu ĉi festo estis paroloj en la nova lingvo, kaj ni entuziasme kantis la himnon, kies komencaj vortoj estis la sekvantaj:

“Malamikete de las nacjes
Kado', kado', jam temp' esta'!
La tot' homoze in familje
Komunigare so deba'.”

(En la nuna Esperanto tio ĉi signifas: “Malamikeco de la nacioj, falu, falu, jam tempo estas! La tuta homaro en familion unuiĝi devas.”)

Sur la tablo, krom la gramatiko kaj vortaro, kuŝis kelkaj tradukoj en la nova lingvo.

Tiel finiĝis la unua periodo de la lingvo. Mi estis tiam ankoraŭ tro juna por eliri publike kun mia laboro kaj mi decidis atendi ankoraŭ 5—6 jarojn kaj dum tiu ĉi tempo zorgeme elprovi la lingvon kaj plene prilabori ĝin praktike. Post duonjaro post la festo de 5-a de decembro ni finis la gimnazian kurson kaj disiris. La estontaj apostoloj de la lingvo provis paroleti pri "nova lingvo" kaj, renkontinte la mokojn de homoj maturaj, ili tuj rapidis malkonfesi la lingvon, kaj mi restis tute sola. Antaŭvidante nur mokojn kaj persekutojn, mi decidis kaŝi antaŭ ĉiuj mian laboron. Dum 5½ jaroj de mia estado en universitato, mi neniam parolis kun iu pri mia afero. Tiu ĉi tempo estis por mi tre malfacila. La kaŝeco turmentis min; devigita zorgeme kaŝadi miajn pensojn kaj planojn, mi preskaŭ nenie estadis, en nenio partoprenadis, kaj la plej bela tempo de la vivo — la jaroj de studento — pasis por mi plej malgaje. Mi provis iafoje min distri en la societo, sed sentis min ia fremdulo, sopiris kaj foriradis, kaj de tempo al tempo faciligadis mian koron per la versaĵo en la lingvo, prilaborata de mi. Unu el tiuj ĉi versaĵoj ("Mia penso") mi metis poste en la unuan eldonitan de mi broŝuron; sed al la legantoj, kiuj ne sciis, ĉe kiaj cirkonstancoj tiu ĉi versaĵo estis skribita, ĝi ekŝajnis, kompreneble, stranga kaj nekomprenbla.

Dum ses jaroj mi laboris perfektigante kaj provante la lingvon — kaj mi havis sufiĉe la laboro, kvankam en la jaro 1878 al mi ŝajnis, ke la lingvo jam estas tute preta. Mi multe tradukadis en mian lingvon, skribis en ĝi verkojn originalajn, kaj vastaj provoj montris al mi, ke tio, kio, ŝajnis al mi tute preta teorie, estas ankoraŭ ne preta praktike. Multon mi devis ĉirkaŭhaki, anstataŭigi, kreksti kaj radike transformi. Vortoj kaj formoj, principoj kaj postuloj puŝis kaj malhelpis unu la alian, dume en la teorio, ĉio aparte kaj en mallongaj provoj, ili ŝajnis al mi tute bonaj. Tiaj objektoj, kiel ekz. la universala prepozicio "je," la elasta verbo "meti," la neŭtrala, sed difinita finiĝo "aŭ," k. t. p. — kredeble neniam enfalus en mian kapon teorie. Kelkaj formoj, kiuj ŝajnis al mi riĉaĵo, montriĝis nun en la praktiko senbezona balasto; tiel ekz. mi devis forĵeti kelkajn nebezonaĵajn sufiksojn. En la jaro 1878 al mi ŝajnis, ke estas al la lingvo sufiĉe havi gramatikon kaj vortaron; la multpezecon kaj malgraciecon de la lingvo mi alskribadis nur tia, ke mi ankoraŭ ne sufiĉ bone ĝin posedas; la praktiko do ĉiam pli kaj pli konvinkadis min, ke la lingvo bezonas ankoraŭ ian nekaptetblan "ion," la kunligantaŭ elementon, donantan al la lingvo vivon kaj difinitan, tute formitan "spiriton."

La nesciado de la spirito de la lingvo estas la kaŭzo, kial kelkaj esperantistoj, tre malmulte legintaj en la lingvo Esperanto, skribas senerare, sed en multepeza, malagrabra stilo, — dume la esper-

antistoj pli spertaj skribas en la stilo bona kaj tute egala, al kiu ajn nacio ili apartenas. La spirito de la lingvo sendube kun la tempo, multe, kvankam iom post iom kaj nerimarkite, ŝanĝiĝos; sed se la unuaj esperantistoj, homoj de diversaj nacioj, ne renkontus en la lingvo tute difinitan *fundamentan* spiriton, ĉiu komencus tiri en sian flankon kaj la lingvo restus eterne, aŭ almenaŭ dum tre longa tempo, malgracia kaj senviva kolekto da vortoj). — Mi komencis tiam evitadi laŭvortajn tradukojn el tiu aŭ alia lingvo kaj penis rekte *pensi* en la lingvo neŭtrala. Poste mi rimarkis, ke la lingvo en miaj manoj ĉesas jam esti senfundamenta ombro de tiu aŭ alia lingvo, kun kiu mi havas la aferon en tiu aŭ alia minuto, kaj ricevas sian propran spiriton, sian propran vivon, la propran difinitan kaj klare esprimitan fizionomion, ne dependantan jam de iaj influoj. La parolo fluis jam mem, flekseble, gracie kaj tute libere, kiel la viva patra lingvo.

Ankoraŭ unu cirkonstanco igis min por longa tempo prokrasti mian publikan eliron kun la lingvo: dum longa tempo restis nesolvita unu problemo, kiu havas grandegan signifon por neŭtrala lingvo. Mi sciis, ke ĉiu diros al mi: "via lingvo estos por mi utila nur tiam, kiam la tuta mondo ĝin akceptos; tial mi ne povas ĝin akcepti ĝis tiam, kiam ĝin akceptos la tuta mondo." Sed ĉar la "mondo" ne estas ebla sen antaŭaj apartaj "unuoj," la neŭtrala lingvo ne povis havi estontecon ĝis tiam, kiam prosperos fari ĝian utilon por ĉiu aparta persono sendependa de tia, ĉu jam estas la lingvo akceptita de la mondo aŭ ne. Pri tiu ĉi problemo mi longe pensis. Fine la tiel nomataj sekretaj alfabetoj, kiuj ne postulas, ke la mondo antaŭe ilin akceptu kaj donas al tute nedediĉita adresato la eblon kompreni ĉion skribitan de vi, se vi nur transdonas al la adresato la ŝlosilon, — alkondukis min al la penso aranĝi ankaŭ la lingvon en la maniero de tia "ŝlosilo," kiu enhavante en si ne sole la tutan vortaron, sed ankaŭ la tutan gramatikon en la formo de apartaj, tute memstaraj kaj alfabeto orditaj elementoj, donus la eblon al la tute nedediĉita adresato de kia ajn nacio tuj kompreni vian leteron.

Mi finis la universitaton kaj komencis mian medicinan praktikon. Nun mi komencis jam pensi pri la publika eliro kun mia laboro. Mi pretigis la manuskripton de mia unua broŝuro (Dro. Esperanto. "Lingvo internacia. Antaŭparolo kaj plena lernolibro.") kaj komencis serĉi eldonanton. Sed tie ĉi mi la unuan fojon renkontis la maldolĉan praktikon de la vivo, la financan demandon, kun kiu mi poste ankoraŭ multe devis kaj devas forte batali. Dum du jaroj mi vane serĉis eldonanton. Kiam mi jam trovis unu, li dum duonjaro pretigis mian broŝuron por eldono kaj fine — rifuzis. Fine, post longaj klopoloj, mi prosperis mem eldoni mian

(Continued on Opposite Page)

Bulletin Board

July-August copy of *Amerika Esperantisto* will come out after the Congress. This will give all our readers fresh news from the National Convention. The last date for all reports or news is July 10th. Extra copies with the congress report are six for one dollar. Order your copies now; they will be very good propaganda material.

Booklist.—We have just issued a new booklist. It is free for the asking; send for yours today.

Fourteen Facts About Esperanto.—A new, revised edition will come out at the end of May. Order this propaganda leaflet in quantity. 100 for 50 cents, 250 for one dollar.

Imitinda.—We received the following clipping: Mrs. Fuller's very interesting letter, by the way, was written on paper with an engraved heading such as I have not seen for several years past.

It reads, "Esperanto Association of America."

"Esperanto" is the so-called "International Auxiliary Language" which has one feature which appeals strongly to myself: "Esperanto needs no spelling; it is spoken as it is written," says a note on the margin of the letter paper."

Mrs. Fuller is a minute man of E. A. N. A. and is using our uniform stationery and the above newspaper item is the result of the facts printed on these letterheads. More people and clubs should use this stationery. Apply for samples and prices at the Central Office.

La Deveno de Esperanto

unuan broŝuron en julio de la jaro 1887. Mi estis tre ekscitita antaŭ tio ĉi; mi sentis, ke mi staras antaŭ Rubikono kaj ke de la tago, kiam aperos mia broŝuro, mi jam ne havos la eblon reiri: mi sciis, kia sorto atendas kuraciston, kiu dependas de la publiko, se tiu ĉi publiko vidas en li fantaziulon, homon, kiu sin okupas je "flankaj aferoj;" mi sentis, ke mi metas sur la karton tutan estontan trankvilecon kaj ekzistadon mian kaj de mia familio; sed mi ne povis forlasi la ideon, kiu eniris mian korpon kaj sangon kaj . . . mi transiris Rubikonon.

DRO. L. ZAMENHOF.

MISS E. W. WEEMS has translated from the English the following books, well suited for easy prose reading to follow the first or beginners' books.

LA TASO DE AMSERVO

(The Cup of Loving Service), by

Eliza Dean Taylor 35c

MALLONGA BIOGRAFIO

DE HENRY FAWCETT,

by Winifred Holt 25c

For sale by Esperanto Association of North America, Fort Lee, N. J.

or Miss E. W. WEEMS, 516 N. Charles Street, Baltimore, Md.

Club Directory—Cont'd

Detroit, Mich. Esperanto Office of Detroit, 2916 E. Grand Blvd., Detroit, Mich. Pres., Dr. Tobias Sigel; Sec'y and Treas., Miss Elizabeth A. Stauffer. Meets irregularly.

Detroit, Mich. Pola Esperanto Associo. Mr. B. Lendo, Sec'y, 3596 29th St.

Duluth, Minn. Duluth Esperanto Club. Pres., Mr. E. Bauer, Arlington Heights, Duluth; Sec'y, Mr. H. Merry.

Jersey City, N. J. Universal Esperanto Fraternity, Inc., 574 Jersey Avenue. President, John Bovit, 128 Market Street, Newark, N. J.; Secretary, Mrs. H. Tylick, 384 Baldwin Avenue, Jersey City, N. J. Meets every second Thursday of the month. Publishes quarterly "Esperanto Lando." Children's classes meet each Saturday evening from 6 to 8.

Lithopolis, O. The Wagnalls Memorial Esperanto Society. Children's classes each Saturday afternoon. Adult classes each Tuesday evening.

Madison, Wisc. Amerika Esperanto Instituto, Hotel Sherlock, Madison, Wisc. Sec'y, Karl Froding. Meets every Sunday at 11 a. m.

Milwaukee, Wis. Bahai Auxiliary Esperanto Group. Meets every Tuesday, 8:00 to 10:00 p. m., at 1124 N. 12th St.

New York City, N. Y. Bahai Centre. Meets every second and fourth Saturday evenings at 119 W. 57th St.

New York, N. Y. SatRondo Nov Jorka. Kunvenas ĉiuvendrede vespere je la 8a Horo, ĉe 108 E. 14a strato. Bonesper Rughamo, antaŭ-sidanto; Jack Feurer, SAT-peranto; Herta Carstens, Protokol-sekretariino; Irene O. Feingold, Korespond-sekretarino; Rose Taub, Kasistino; Ben Odinov, Instruisto.

Peoria, Ill. Organizer, A. S. Mellichamp, 119 Butler St. Classes conducted by A. S. Mellichamp and Norman McQuown.

Philadelphia, Pa. Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

San Francisco, Calif. The Esperanto Ass'n of California, 309-11 DeYoung Bldg., San Francisco, Calif. Sec'y, R. Hill. No regular meetings.

St. Petersburg, Fla. Sunbrila Rondo, 127 1st Ave., St. Petersburg, Fla. Pres., Roy S. Hanna; Sec'y and Treas., Esther Owen-Flint. Meets at Princess Martha Hotel, Wednesdays, at 3 p. m.

Topeka, Kans. Topeka Esperanto Association, 1122 W. 8th St., Topeka, Kans. Pres., Captain Geo. P. Morehouse; Sec'y and Treas., Mrs. Lida R. Hardy. Meets first Thursday of the month at 1122 W. 8th St. Two advanced and Beginners' classes.

Toronto, Canada. Toronto Esperanto Klubo, Peacock Inn, 99 Yonge St., Toronto. Pres., Elvin J. Bengough; Sec'y and Treas., Harry Wall. Meets 6:30 p. m. at Peacock Inn.

Worcester, Mass. Worcester County Esperanto Society. Meets at call of Council, at R. 17 P. O. Dr. Gustave Desy, Pres., Box 450, Millbury, Mass.; Odiorne Gleason, Sec'y and Treas., R. 17 P. O.

Strictly laŭfundamenta and a direct answer to

HOW TO MAKE PERMANENT ESPERANTISTS?

Begin with Frost's

SPOKEN ESPERANTO

for teachers and self study plus 5 Sp'esp'o bildaroj for pupils together \$1.00—or 10 Sp'(oken) Esp'(eranto) bildaroj \$1.00; or 50 All-World Base Maps \$1.00, to locate commerce, history, travel.

N. W. FROST, Brownfield, Maine; or
ESPERANTO ASSOC. OF NORTH AMERICA
FORT LEE, NEW JERSEY

THESE BOOKS SHOULD BE IN YOUR
ESPERANTO LIBRARY:

- Al la Norda Poluso*—The heroic story of Andree's Lost North Pole Expedition. Translated into Esperanto as a record for all nations Paper bound \$3.50
Cloth bound 4.00
- Jarmiloj Pasas*—World's History written in original Esperanto by Professor Herman Haefker. In two bound volumes 5.00

These books should be in the hands of every Esperantist. They are the pride of any and all libraries.

Order Them Today!

F R E E

With an order for both books we shall include, free of charge, a copy, bound in green cloth, of the

North American Esperanto Almanac, 1931.

Regular price, 75 Cents.

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

FORT LEE, N. J.